NIA PONTO

Grupo Esperantista
Barrencalle Barrena, 7- 1ª dekstre
E-48005-BILBAO (Hispanio)
Redaktas: J.Miguel García Iturrioz (tepgaitj@lg.ehu.es)
Kunven-tago: Vendredo (7,30-9 h.)
☎ 34-944.164.492
☎ portebla: 34-658.709.087
jesusmiguel.garcia@ehu.es
TTT-ejo: http://www.geocities.com/esperantobilbao

Jar-kotizoj: Normala: 20 ∈. Speciala: 15 ∈. Familia: 35 ∈.
BBK-konto: 2095-0141-41-2218001550

JANUARO/FEBRUARO 2008 **Nro. 73 (1/08)**



Estraro de la Grupo Esperantista de Bilbao

LOKE ...

LOTERÍA DE NAVIDAD.



Como de costumbre, tampoco este año ha habido suerte con la lotería de Navidad. Pero no desesperamos: algún año nos tiene que tocar un premio grande.
A pesar de ello, damos las gracias a todos los que han ayudado en la venta de los boletos y a todos aquéllos que los compraron, pues unos y otros contribuyen al mantenimiento de nuestra centenario Grupo.

ZAMENHOFA FESTO.

La pasintan 15-an de decembro, kiel tradicie, ni kuniĝis en la Grupejo por festi la naskiĝdatrevenon de la kreinto de nia lingvo. Ne estis multe da ĉeestantoj, sed la etoso, kiel kutime, estis amikema kaj agrabla. La diversaj manĝaĵoj alportitaj permesis viglan babiladon ĉirkaŭ tablo.

PAGO DE CUOTAS 2007.

Volvemos a insistir, ya que hubo errores en la anterior circular: si a la izquierda de estas líneas encuentras una "X", es que aún no has pagado la cuota de socio correspondiente al año 2007. El importe a pagar y el número de cuenta en que la puedes hacer efectiva aparecen en la cabecera de esta circular. Gracias y esperamos tus noticias.

NUEVAS CUOTAS PARA EL AÑO 2008.

Os recordamos que, en la Asamblea General del año pasado, se aprobó un pequeño incremento de las cuotas anuales de socio para este año 2008, así que, a partir del 1 de enero, éstas son:

Cuota normal: 20,00 euros anuales.
Cuota reducida: 15,00 euros anuales.
Cuota familiar: 35,00 euros anuales.

Para facilitar el cobro, a aquéllos que aun no lo hayan hecho, les rogamos que nos hagan llegar un número de cuenta en la BBK y así, se podrán despreocupar de este pago anual pues nosotros mismos lo tramitaremos.

SOCIARO.

Dum la jaro 2007,

Aliĝis al la Grupo:

DÍEZ GRACIÁN, Gorka
GRACIÁN BEIGA, Marta

Eksis:

GLARIA ZAPATERO, Alejandro	Ne pagis kotizojn
RIOJA AGUILAR, Adolfo	Ne pagis kotizojn
URIBE-ECHEBARRIA, Gregorio	Ne pagis kotizojn
VERGARA ROSA, María	Ne pagis kotizojn
ANTÓN SANZ, M. Soledad	Propravole (Telefone)
FERNÁNDEZ MADERA, Luis Roberto	Propravole (Telefone)

Je la 31-a de decembro 2007-a, membris en nia Grupo 65 homoj.



Plato, kiu staras sur muro ĉe la enirejo de nia sidejo

HEF-Oficejo.

La estraro de HEF deĵoras, persone, lunde inter la 17,30 kaj la 20,00 horo. Dum aliaj tagoj kaj horoj vi povas telefoni al 91 446 80 79 (aŭtomata respondilo) aŭ kontakti rete: admin@esperanto.es, sed atendu ĉar vi ricevos la respondon la sekvontan lundon.

Subvencio al HEJS.

Kvankam ne estis antaŭvidata en la buĝeto por 2008, HEF subvencios al HEJS per 80 eŭroj por partopreni en la IRO-08 (Iberia Renkontiĝo) okazonta en Benicàssim (Castellón). Celo de la subvencio estas helpi al la vojaĝkostoj de muzikisto, kiu ludos koncerton dum la renkontiĝo.

Demisio.

La 8an de januaro 2008, Pedro Garrote prezentis al la estraro de HEF demisian leteron, per kiu li sciigas sian deziron ĉesi kiel kasisto/librotenisto. Laŭ la 19a artikolo de la Statuto, la estraro devas nomumi anstataŭanton, ratifota en la venonta ĝenerala kunsido. Sed antaŭ tiu momento, kandidatoj estas bezonataj.

("Nia Voĉo". Organo de Madrida E-Liceo. 28/01/2008)

67-a Hispana Kongreso 2008. CUENCA 3/6 DE JULIO.

Alejandro Pareja informis pri la startpunkto de la diversaj aranĝoj pripensitaj por la venonta Hispana Kongreso, kiu okazos en Kuenko. La 11an de novembro li vizitis la antaŭplanitaj kongresejon, santempa loĝejo, t. e., la "Residencia Universitaria Alonso de Ojeda" kaj parolis kun ĝia Direktoro, sinjoro Aurelio Cavero Chumillas. Li disponigis sian helpon rilate kongresejon sed, same kiel la Delegito pri Edukado, diris ke oni atendas ankoraŭ la aprobon flanke de la "Junta de Comunidades" en Toledo. Oni rekomendis al Alejandro ke li vigligu la aferon ĉe la Universitato de Kastilio-La Manĉo.

Pri la programo de la Kongreso, oni ricevis kelkajn valorajn proponojn, ĉefe por la kultura fako. Oni publikigas aliĝilon en la ĵus aperinta numero de "Boletín", kun la samaj aliĝkotizoj validaj por la pasinta Kongreso en Palos, kaj ĝi aperos ankaŭ en la retpaĝaro de HEF post kelkaj tagoj.

Lupe rekomendas ke unu el la prelegoj temu pri UEA, kiu celebras sian centjariĝon; kiel prelegonto ŝi proponas al F.J. Moleón, kiu laboris ĉe UEA aŭ al R. Urueña, kiu spertas pri la internacia movado.

Alie, Manolo Parra akceptas esti la kongreskontisto.

(Protokolo de la kunveno de la estraro de HEF. 19/11/2007)

E-KONGRESOJ POR 2008.

14/16 marto. Benicassim (Castellón). Iberia Renkontiĝo (IRO-08).

03/06 jul. Cuenca. Kongreso de Hispana Esperanto-Federacio.

19/26 jul. Rotterdam. 93a Universala Kongreso.

26 jul/2 aŭg. Szombathely (Hungario). IJK, Internacia Junulara Kongreso de TEJO.





Kiel ĉiam, pliaj informoj pri kongresoj kaj aliaj renkontiĝoj, ĉe nia Grup-ejo. Ankaŭ informoj pri vojaĝeblecoj kaj kunvojaĝantoj.

Printempa E-aranĝo en Benicassim.

Dum 14-15-16 de marto okazos tre interesa E-aranĝo en la urbo Benicassim, proksime de Valencio. Mi rekomendas al ĉiuj kiuj havos eblecon, partopreni. Ĝenerale ne okazas ĉe ni multaj e-aranĝoj, kaj ni devas profiti la okazon. La retpaĝo pri la Iberia Renkontiĝo 2008 troviĝas en la jena adreso:http://www.esperanto.cat/ir2008/ (Kliku sur la bonvena vorto en la lingvo de vi preferata).

(Aŭgusto Casquero. 18/01/2008)

Mortis Claŭde Piron.

Hieraŭ, en sia hejmo, forpasis unu el la plej eminentaj esperantistoj de nia tempo, CLAUDE PIRON (1931-2008), tradukisto ĉe UN kaj ĉe la Monda San-Organizo, poste psikologo, aŭtoro de populara lernolibro "Gerda malaperis", de vaste legata "La bona lingvo", kaj de muzika kasedo "Frandu Piron". Sub la pseŭdonimo Johan Valano li verkis serion da originalaj romanoj.

(Miguel Gutiérrez Adúriz. 23/01/2008)

TRA LA MONDO ...

UEA kandidatas al Nobel-premio.

Du svisaj parlamentanoj proponis UEA-n kiel kandidaton por Nobel-Premio. Eblas legi la novaĵon en la hispana ĉe:
http://www.kontakto.info/parlamentarias_suizas_Premio_Nobel_de_la_Paz_para_Asociacion_Universal_de_Esperanto_UEA.html

Informo en Esperanto:
http://www.liberafolio.org/2007/svisaparlamento

(Tonjo del Barrio. Madrido. 01/12/2007)

La Papo parolas Esperante.

Mesaĝo aperinta en soc.culture.esperanto:
Ankaŭ je ĉi tiu Kristnasko 2007, la Papo salutis en Esperanto. Oni povas aŭdi la saluton ĉe
http://www.ikue.org/kristnasko2007/kristnasko2007.htm

(Darío Rodríguez. Madrido. 25/12/2007)

Alia propono por ke UEA kandidatiĝu al Nobel-premio.

Laŭ informo de Georgo Handzlik du polaj parlamentanoj el la urbo Bielsko-Biala rekomendis UEA por paca Nobel-premio. Samideanino Margareta Handzlik, membro de la Eŭropa Parlamento kaj s-ro Rafal Muchacki pola senatano. Ambaŭ reprezentas la nun regantan en Pollando Civitanan Platformon.

(Barbara Pietrzak, sekretariino de UEA. 10/01/2008)

Esperanto inter 20 pli grandaj internaciaj projektoj.

Esperanto estis elstare menciita en la prestiĝa germana semajna gazeto "Die Zeit". Ĝia jarfina resuma ĉefartikolo "Spiel ohne Grenzen" ("Ludo sen limoj") komparas la 20 plej grandajn internaciajn projektojn, kiuj celas solvi enigmojn de la naturo aŭ utili al la homaro en kvin kampoj: fiziko, kulturo, biologio, spaco kaj medio. Kiel unu el la kvar plej gravaj internaciaj projektoj en la kampo "kulturo" oni elektis Esperanton, kun bildo de Zamenhof: http://www.zeit.de/online/2008/02/bg-weltraetsel?6

(Amri Wandel. Israelo. 11/01/2008)

Lasta sturmo por superi 6000.

Mi petas ĉies kunlaboron por certigi, ke ankaŭ pasintajare la nombro de individuaj membroj de UEA estu super la magia limo de 6000. Fine de decembro la nombro estis 5965. Hodiaŭ, du semajnojn poste, ĝi jam kreskis al 5977, ĉar daŭre la CO ricevas pagojn de membroj, kiuj ne volas havi en sia membrohistorio truon en 2007. Oni tamen ne povas prognozi, ĉu la nombro atingos 6000 sen apartaj fortostreĉoj, ĉar la nombro de kotizpagoj post la jarfino ege varias de jaro al jaro. Komence de la pasinta jaro nur 15 membroj pagis kotizon por la antaŭa jaro, sed en 2005 ilia nombro estis 110.

Kvankam estas realisme esperi, ke ni superos 6000, oni eble ne atingos la nombron de la jaro 2006, kiam UEA havis 6066 individuajn membrojn. Temas pri tio, ke pasintjare multaj eŭropanoj ne membriĝis, ĉar ili ne partoprenis en la UK. Tion kompensis granda kresko en Japanio, kie en 2006 estis 410 membroj sed pasintjare 859. La duobliĝo de membroj en Japanio signifas, ke en 2007 Japanio konkeris la unuan lokon en la membrostatistiko de UEA.

La falo okazis ĉe la junaj membroj. Tion kaŭzis IJK, kiu en 2006 estis en Sarajevo sed pasintjare en Hanojo kun malmulte da eŭropanoj. En 2006 estis 515 junaj membroj sed pasintjare 387, kio estas je 128 malpli ol en 2006. Se inter la malfruaj membroj, kiuj ankoraŭ pagos por la pasinta jaro, estos sufiĉe da gejunuloj, la fina nombro de TEJO-membroj povos atingi 400.

(Osmo Buller. UEA. 15/01/2008)

400.000 poloj povos studi Esperanton.

400.000 poloj ricevos Esperanto-kurson, pro tio ke en septembro 2008 ĉiuj legantoj de la prestiĝa pola tutlanda ĵurnalo "Gazeta Wyborcza" ricevos kun la gazeto ankaŭ kompakt-diskon kun kurso de Esperanto kaj ampleksa prezento de la Esperanto-movado. La diskon laŭ mendo de la urbo Bjalistoko produktos la teamo de E @ I (ikso.net), kaj la eldonon financos la urbo mem. La eldono de la disko estas parto de granda informa kampanjo pri Esperanto, iniciatita de la urbo Bjalistoko lige kun la Universala Kongreso de Esperanto, okazonta en la naskiĝurbo de Ludoviko Zamenhof en 2009.
La kompleta artikolo troveblas en la ligilo: http://www.liberafolio.org/2008/bjalistokakd/

(Darío Rodríguez. 23/01/2008)

E-Ekspozicio ĉe la Eŭropa Parlamento.

En la Eŭropa Parlamento en Bruselo la 30-an kaj 31-an de januaro okazas ekspozicio pri la temo "Esperanto kiel perilo de translimaj junularaj kontaktoj". La ekspozicio povis okazi pro subteno de Ljudmila Novak, slovena ano de la Eŭropa Parlamento. Ŝi mem lernis Esperanton en sia junaĝo, kaj plu simpatias al la lingvo, kvankam ŝi ne aktive parolas ĝin. La ekspozicion praktike organizis kaj financis Eŭropa Esperanto-Unio, kaj la inaŭguron ĉeestis Sean O'Riain, prezidanto de EEU kaj irlanda diplomato, kiu antaŭnelonge estis taskita direkti la ĵus kreitan irlandlingvan tradukservon de la Eŭropa Komisiono. Legu pli en http://www.liberafolio.org/2008/eueksp o/

(Darío Rodríguez. 31/01/2008)

NIAJ AKTIVULOJ ...

JULIO J. JUANES SÁINZ (1920/1997)



1959.J.Juanes intervjuas al valenciano L.Hernández

Julio Juanes naskiĝis en Bilbao la 25an de septembro 1920-a. Aŭtodidakto, li lernis Esperanton memstare kaj kiam la E-Grupo de Bilbao akiris la rajton denove agadi laŭleĝe, en 1953, li engaĝiĝis al la movado, kiel estrarano kaj instruanto; tiun-ĉi lastan taskon li plenumis dum pluraj jaroj en la sidejo de la Grupo.

Tiel fervore li partoprenis en tiu renaskiĝanta Esperanta mondo de Bilbao, ke baldaŭ fariĝis referenco de ĝi kaj ĝiaj aktivadoj, ĉefe kulturaj.

Li preparis kaj dissendis radio-programon "Esperanto sur la anteno", pere de "Radio Bilbao", sekvante la laboron, kiun komencis, la 12-an de marto 1955-a, la juna Francisco Nagore, kiu mortis kelkaj monatoj poste en akcidento; temis pri sukcesa programo, disaŭdigita tra Eŭropo ĝis la jaro 1966.

Aŭtoro de la esperanta lernolibro "Método Bilbao", uzata en la kursoj de Bilbao dum multaj jaroj. Alloga preleganto, li partoprenis multajn debatojn inter kleruloj kaj reprezentis nian Grupon okaze de kongresoj kaj kunvenoj. Specialan laboron li disvolvigis dum la UK de Madrido en 1968, kiel deĵoranto ĉe la gazeta informejo.

Ankaŭ tre ofte prelegis en la E-rondo de Bilbao pri la vivo kaj verko de Zamenhof, precipe dum la Z-festoj.

Verkanto de la esperanto-teatraĵo "Kiam Karla alvenis", unuafoje prezentata, kun granda sukceso, de junaj membroj de la Grupo de Bilbao dum la zamenhofaj festoj de 1972.

Kiel poeto li ricevis premiojn en la 19aj Internaciaj Floraj Ludoj de Rubí en 1979, en Reus (22aj Floraj Ludoj de 1982) kaj en Sant Cugat del Valles (25aj Floraj Ludoj de 1985), premio aljuĝita al lia verko "Poezio simpla por edzino klarokula", kies kortuŝa deklamado oni aŭskultis emocie kaj ricevis grandan ovacion. En nia memoro restas ankaŭ lia majstra deklamado dum la jubilea kongreso de la jaro 1987 en Madrido. La longdaŭra aplaŭdo, kiun li ricevis de la entuziasmigita ĉeestantaro, kortuŝis nin ĉiujn.

Kutima partoprenanto de la hispanaj kongresoj, li estis LKK-ano de la okazintaj en Bilbao en la jaroj 1953, 1966 kaj 1989. En tiu-ĉi lasta, li estis vicprezidanto de la LKK kaj lia voĉo aŭdiĝas sur la video-bendo "Vivi en Eŭskio", eldonita de la Vaska Registaro okaze de la kongreso.

Patro de sep gefiloj, kelkaj el ili ankaŭ estis aktivaj esperantistoj, ĝis kiam la laboro malproksimigis ilin el Bilbao.

Julio Juanes mortis en Bilbao la 26-an de majo 1997-a.